

La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia
Esperanto-Asocio.*

Redakcio-Administracio:

BOX 1367, ELIZABETH STREET P.O., MELBOURNE
(AUSTRALIO).

N-ro 31. Melburno (Melbourne), Australio. 10 Januaro, 1923. Price 4d.

The Australasian Esperanto Association.

AFFILIATED GROUPS.

- Belgrave.**—(E. Grupo). Fino S. Giles, "Warawing," South Belgrave.
- Brisbane.**—E. Klub. Sro. Sycamore, "Bonvenu," O'Mara St., Lutwyche, Brisbane.
- Hobart.**—Esperanto Society, Sro. E. F. Heritage, 35 Risdon St., Newtown, Hobart.
- Melbourne.**—Hardware Chambers, 359 Little Collins St., Friday, 8 p.m. Rationalista Esperanta Grupo, Temperance Hall, Melbourne.
- Mont Albert.**—Sek., Fino B. K. Blythe 10 Victoria Ave., Surrey Hills.
- Northcote.**—(La Verda Stelo). Sek., Sro. G. Delaney, 16 Gordon Grove, Northcote.
- Oakleigh.**—(Iru Antaŭen). Sek., Sino. R. Bigelow, Kangaroo Rd., Oakleigh.
- Rabaul.**—(Nov. Guinea, E. Grupo). Sro. F. Simon, Rabaul, New Guinea.
- Sandringham.**—(Marborda Grupo), Fino M. Hollow, "Porteath," Bamfield St., Sandringham.
- S. Australia.**—Esperanto Society, Sro. W. L. Waterman, 20 Henley St., Torrensville, S.A.
- Sydney.**—Esperanto Society, Sro. L. Fosto, "Edna," Chisold Parade, Campsie, N.S.W.
- Townsville.**—Esperanto Society, Sro. Chas. Price, School of Arts, Stanley St., Townsville.
- W. Australia.**—(Nigra Cigna Grupo), Fino F. Cherrett, 46 Leonard St., Victoria Park, Perth, W.A.
- Whangarei, N.Z.**—Sro. W. H. King, P.O., Whangarei Nth., Auckland, N.Z.

Chocolate Bowl Sweets.

Made Specially for "My Lady's" delectation. Available in choice and exclusive varieties daintily packed. Phone your next order, or write for particulars of these "Made-to-day" Sweets. We supply quantities to suit individual requirements.

ASK FOR

Chocolate Bowl Sweets at Confectioners—All Suburbs.

Esperanta entrepreno—Deziras korespondi kun samfakanoj en Usono, Svisujo, Francujo, Rusujo, kaj Austrujo, pri farado de chokoladaj sukerajhoj.

**18 CENTREWAY, COLLINS STREET
MELBOURNE.**

Telephone: Central 2210.

Universal Esperanto Association.

Founded, 1908.

Objects:

To spread the use of the international help language Esperanto.

To facilitate communication between the peoples without distinction of race, nationality, religion or language.

To institute international services available by everyone whose intel-

tual and material interests extend beyond the limits of their own country

Delegates in every country.

Membership, 5/- per annum, or with the monthly magazine "Esperanto," 12s. 6d.

Subscriptions for 1923 are now payable to—

O. W. BALLARD (Delegate for Melbourne and Chief Delegate for Australia),
27 Lansdowne Road, East St. Kilda, Victoria.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Gis la 6a de Januaro ni ricevis la jenajn sumojn.—

G. H. O'Dwyer, 4/6; W. Macdonald, 4/6; A. Klein, 12/6; American Tea, £4; C. Price, 4/6; H. Ballentyne, 3/-; G. Bolden, 4/6; L. S. Payne, 5/-; A. A. Scammell, 4/6; A. McKenzie, 4/6.

La Suda Kruc

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 31. Melburno (Melbourne), Australio. 10 Januaro, 1923.

NEW YEAR'S MESSAGE FROM THE PRESIDENT OF A.E.A.

To all readers of "La Suda Kruc" I extend my heartiest wishes for a most prosperous year 1923.

We start a new year of activity with the intention of making greater strides than ever before in the history of Esperanto in Australasia.

In the educational communities of New South Wales and Queensland, success has crowned our efforts, and our language has received approval. We are proceeding on the same lines in other States, and shall not cease until Esperanto is a permanent subject in all schools.

This cannot take effect until there is a demand for its services by the people, business organisations and educationalists, and it is our work to convince these people of the suitability of our language.

To this end we intend to push ahead in the formation of new groups, and I appeal to all readers to assist me in this work. Two or three in each centre are sufficient to make a start, and we are ready to do our part.

Our most useful instrument in propaganda and in keeping our members posted in the latest news, and affording opportunities for exercise in the language, is our journal.

This has just been improved, and we hope to still further improve it. Although it is a heavy drain on our financial resources, we are sparing no effort to keep it going. If all the original subscribers would keep their subscriptions renewed, our greatest burden would be removed. We need new subscribers, and your co-operation in sending news items and helpful suggestions.

The Fourth Australian Esperanto Congress will be the great event of the year, and every Esperantist should arrange to be in Sydney at Easter. An excellent holiday is assured, and it will mark another important step in our history.

To sum up, let our aim be to establish Esperanto more firmly by—

1. Forming new groups or joining up existing ones, and creating a demand.
2. By actively supporting our journal, and sending at least one new subscription.
3. By making the Congress the greatest yet held in Australia.

If each reader will do his or her part, then we must quickly achieve our objective.

Ciam antaŭen! Samideane Via.

—A. R. COHEN.

KRONIKO.

WELLINGTON (Nov-Zelando). S-ro. W. L. Edmanson skribas—Mi daŭrigas mian laboron inter la mal-feliĉuloj kaj jam ok trafis la Diplomon kaj aliaj prepariĝas. Tiu laboro amuzas min multe kaj ĝi faras multe da bono al tiuj, kiuj ja bezonas ion intelektan por ilia restariĝo.

MELBURNO (V.)—Fino, Maud Helm, el Melbourne, fariĝis la nacia direktorino en Aŭstralio de la Internacia Romkatolika Asocio. Ŝi klarigis la celojn de la asocio al interesuloj la 20an de decembro kaj gajnis multajn novajn lernantojn por Esperanta stud-grupo, kiun ŝi instruas ĉiun mardon, ĉe Katedrala Halo, strato Brunswick.

Sabaton, la 9an de decembro la Northcote Esperanta Grupo havis feston. La ĉefa ero estis "Mock Marriage," (ŝerca Edziĝo). Poste sekvis esperanta diologo kaj, fine, danco.

NELACIGEBLA PROPAGANDISTO.

Doktoro Fred. Williams, el Melbourne, antaŭ nelonge vizitis Sudan Tasmanujon, kaj poste, la okcidentan parton de Viktorio.

La Hobarta grupo kontentige progresas kaj havas la valoran helpon de s-ro. Middleborough, loka librovendisto, en kies butikoj oni trovas bonan provizon de Esperantaj libroj.

S-ro. D. Guilbert, el la Landa Departemento, delegito de la U.E.A., kaj, fino. Cora Hannaford, estrino de la Eaton Bray Lernejo, en kiun ŝi kondukis kaj kie ŝi nun instruas Esperanton, tre petas, ke Esperantistoj trapasante Hobarton, vizitu ilin.

En Hobarto, New Norfolk kaj ankaŭ en Okcidenta Viktorio, instruistoj, profesistoj, komercistoj kaj kolegiaj knaboj estis avidaj ricevi literaturon, diskuti Esperanton kaj komenci la studadon de la lingvo.

D-ro. Williams dum profesia vizito al Castlemaine, (V.), starigis grupon en tiu progresema urbo. Post nelonge li iros al Sidnejo por kelktempa vizito.

HERE AND THERE.

The European Federation of the Theosophical Society will hold a Congress in Vienna in July next. Esperanto will be one of the official languages. This is the first time such

recognition will have been given to Esperanto at any Theosophical gathering.

The latest news bulletins from the International Labor Office deal with the admission of Hungary to the League of Nations, and the consequent attendance of Hungarian delegates at the Labor Office; classification of emigration figures; conservation of the health of the workers; the first co-operative agricultural society; the opening of the fourth Labor Conference; improvement of labor conditions; Japan and the unemployment problem.

During the Brazilian National Exhibition, Police Constable Jose Agostinho de Macedo will be stationed at the Avenue Rio Branco. He will have a white ribbon and green star and the words "Esperanto" and "Interpreter" on his left arm.

In the largest hall of the Lithuanian University s-ro. P. Madem commenced an Esperanto course on 29th October. The attendance was large, and the new lecturer and his subject were well received.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

La esperantistoj de Melbourne havis la bonegan ideon organizi koncerton por helpi U.E.A. Ĝi estis grandega sukceso de muzika flanko kaj de financa vidpunkto; 400 sv. fr. estis senditaj al Genevo. La organizintoj ricevu niajn korajn gratulojn kaj dankojn.

La Centra Oficejo esprimas per tio ĉi koran dankon al la samideanoj-membroj en Melbourne (Aŭstralio) kiuj sendis per nia ĉefdelegito, S-ro. Ballard, diversajn monhelpojn, kies finsumo estas pli ol 500 Frankoj. Jen ekzemplo de kompreno por la situacio de nia Asocio, rekomendata al ĉiuj bonvolemaj samideanoj.

La supraj citaĵoj el "Esperanto" montras, ke la penoj de la ĉi tieaj anoj tre kontentigis la estraron ĉe Genevo.

La nuna jaro devus doni eĉ pli bonan rezultaton. Por decidi pri la manieroj kaj rimedoj la membroj havos sian ĵaran konvenon, merkredon, la 7an de februaro, je la oka vespere, ĉe la Aŭstralia Preĝejo Halo, strato Russell, kiam oni esperas ke ĉiu ano ĉeestos.

ESPERANTO KAJ AMIKECO.

De J. G. Pyke.

La plej granda plezuro en la mondo estas, havi amikojn, kaj tiuj el ni, kiuj estas Esperantistoj, trovas, ke tiu plezuro ne estas malpli granda pro la posedo de esperantistaj amikoj, kiel patrolingvo estas malsama, ol la nia. Multe da belaj pensoj oni skribis kaj kantis pri la amikeco. Elbert Hubbard diras:

"La penso, havi amikojn kaj esti amiko, venas al ni, kiel plej alta beno; La amikeco estas preskaŭ la religio—konfesi per sia vivado, ke, por havi amikojn oni devas mem esti amiko, tio estas religio." Kiam oni ricevas leteron kun la varmaj vortoj de amikeco esprimataj en la "kara lingvo," tio efikas, kiel inspiro; oni sentas, ke oni atingis la fundoŝtonon, sur kiu staras ĉia religio. Tiu ĉi lingvo estas la lingvo de la plej bona parto de ni. Ĝi estas la ora fadeno, kiu ligas la korojn de la tuta mondo.

Amikeco! Mistera cemento de l' animo, dolĝiganto de la vivo, kaj lutaĵo de l' socio. Jes, de socio, kiu estas tiel vasta, kiel la mondo.

Nenio estas tiel higiena, kiel la amikeco. Niaj amikoj vidas nur la bonan en ni, kaj per tio mem ili eltiras el ni la plej bonan. Ni povas esti sinceraj en niaj leteroj; ni povas "pensi voĉe." Ni povas kuraĝi pli en la fratolingvo, ol en la patrolingvo, kiel ajn paradoksa ŝajnas tiu aserto. La leganto eble memoras la versojn de Oliver Wendell Holmes:

La lingvo havas du vualojn, kaj ŝirmate sub iliaj faldoj ni kuraĝas esti . . . ni mem, kaj ne l' alia memo, kiu kape signas, ridetas kaj babilas nianome; unu, la preĝo, donas plenliberon al la longo diranta al ĉielo niajn plendojn, pekojn; l' alia, poezi', per brila reto kovras parolon nian nudan, al ĝi kuraĝon donas.

Se la bonkora Amerikano nur vivus en nia tempo, li povus aldoni, ke oni povas kuraĝi en alia lingvo. Estas gloro kaj ravo, povi elverŝi la amon, kiun ni sentas, kaj scii, ke ni havas volontan aŭskultanton, dank' al ĉu lerninta la dek ses simplajn regulojn de la Zamenhofa lingvo. Oni povas

sugesti, ke ĉio ĉi odoras mankon de amo al nia patrolingvo kaj mankon de patriotismo. Sed mankas nek unu, nek la alia; ĉar mi certas, ke miaj malproksimaj korespondantoj dirus al vi, ke ili konkludas, ke la plej bona afero en la mondo estas, deveni de fortika Brita raso kaj loĝi en Aŭstralio.

Mia Germana korespondanto skribas al mi, ke li verkis artikolon pri Aŭstralio per la informoj kaj fotografiaĵoj, kiujn mi sendis al li. Bohema fraŭlino serĉadis en la librejoj de Praha tradukojn de la romanoj de "Georgo Eliot," ĉar mi sendis al ŝi esperantan artikolon pri nia glora angla aŭtorino. Rusa knabeto nun interesas sin pri la birdoj kaj bestoj de Aŭstralio, pro bildo de ridanta birdo "kukaburo" sur Kristnaska karto sendita de mi. Same ni povas per la patriotismo de niaj korespondantoj koni la gloron de ilia literaturo, la belecon de iliaj arbaroj kaj la grandiozon de iliaj historiaj urboj—kaj eble tio ne estas malbonefika je Aŭstraliano nekapabla pensi pri io ekster sia malvasta hejmvilaĝo!

Kaj tio certe devigas nin koni nian propran landon. Tiaj amikoj faras tiel multajn demandojn pri tiu ĉi por ili nekonata lando, ke oni devas akiri multajn informojn pri sia lando por ilin respondi.

Melburno, 1911.

Trad: A. Delsudo.

[Ĉi tiu artikolo aperis, anglalingve, en "La Suda Kruc", de Februaro, 1921. "Esperanto," recenzante la gazeton, diris, ke la malgranda traktato indas tradukon. Komparo de la traduko kun la originalo estos instru-plena por studentoj. Red.]

AMBASADORO IŜUIN.

PROPAGANDOS ESPERANTON.

La 14-an de Apr. S-ro K. Janagida vizitis la Informan Departementon de la Ministerio de alilandaj aferoj kaj tre efike propagandis Esperanton al ĝia estraro. Ambasadoro H. Iŝuin, direktoro, tute konvinkita pri la neceseco de Esperanto, proponis aĉeti je sia kosto Esperantajn librojn kaj disdoni ilin al la oficistoj de la Ministerio.

KAMPFESTO ĈE DARLING. LA PARTOPRENINTOJ ĈE LA DOMO DE S-RO. COHEN.

La Melburna sekcio de la Aŭstralazia Esperanto-Asocio, laŭ afabla invito de s-ro. A. R. Cohen, prezidanto de la asocio, vizitis lin en lia hejmo ĉe Darling, je la 16a de decembro, antaŭ ol disiĝi por la Kristnaska libertempo. Post interesa marŝado sur la malaltaj montetoj oni submetis sin al la fotografisto, (s-ro E. J. Cox), kaj tiam sin sidis ĉe la tabelo. Inter la gaja babilado oni ne forgesis fari justaĵon al la bongustaĵoj. Vespere

nelacigeblaj gesamideanoj ludis ŝaradojn, kaj ĉarmis la ceterajn per belaj arioj sur la gitaro kaj la mandolino. Dum la vespero estis vendo de malgrandaj donacoj por helpi la kazon de "La Suda Kruco." Ĉiu penis pagi pli ol sia najbaro, do "La Suda Kruco" gajnis kvar funtojn. La ĉeestantojn tre ŝuis sin kaj kore dankis s-ran, Cohen kaj liajn parencojn por lia bonvolo al la granda nombro de Esperantistoj, kiuj partoprenis ĉi tiun memorindan ekskurson.



(Por la kliso ni esprimas niajn dankojn al "The Leader," Melbourne).

Malantaŭa vico:—S-roj. H. Byatt, C. W. Ballard, Percy T. B. Hudson, Parker, A. R. Cohen, A. Klein, Traynor, Meirs kaj Predl.

Meza vico:—F-inoj. Gardiner, V. Irwin, Byatt, L. Irwin, s-ino. Bigelow, f-inoj. Walford, Lacey kaj Maud Helm.

Antaŭa vico:—F-inoj. Harris, Helm, A. M. Hopton, L. W. Saw, s-inoj. M. Purnell, Byatt kaj Klein. La knabineto estas nevino de f-inoj Helm kaj la knabo filo de s-ino. Bigelow.

MALMOLAJ LIGNOSPECOJ KAJ SANO.

Tio kion la spertulo prenas al si hodiaŭ, la klera publiko alprenos morgaŭ, sed iam la tempo estas longa, ĉar la klerigado de la publiko ofte estas malrapida kaj la plej sendifektaj ideoj ne ĉiam estas rapide asimilitaj. Ĉi tion oni povus plene ilustri per la sperto gajnita el multaj stadioj de la propaganda laboro per kiu la aŭstralia publiko kondukigis ekkoni la bonajn kvalitojn de produktoj de aŭstralia tero, kiujn, pro ilia abundeco oni antaŭe pensis utiligi nur por malsupera uzado. Rilate al tio, nenio estas pli vera, ol pri aŭstraliaj lignospecoj. Eĉ inter tiuj, kiuj plej rapide perceptis la meriton kaj plej frue etendis la uzon de tiuj lignospecoj, la profito de ties uzado unue ne estis plene rimarkata. Kelkokaze interesigintaj, sed neantaŭjuĝantaj, alilandaj observantoj malfirmis niajn okulojn al meritoj kaj valoroj de niaj lignospecoj, kiujn ni antaŭe ne rimarkis, aŭ nur neperfekte taksis. Kompreneble oni unue altetaksis tiujn konstruajn kvalitojn de fortoco kaj sendanĝereco kaj flanke de malaltgrada flamiĝebleco, kiuj metas la aŭstraliajn malmolajn lignospecojn en apartan klason, kaj vere, rilate al tio, oni apenaŭ povas tro laŭdi ilin. Sed nek la konstrua spertulo, nek la lertulo pri la klasigado de materialoj laŭ la vidpunkto de ilia efiko por pliiĝi aŭ malpliiĝi la riskon de fajro ampleksas la vidpunktojn laŭ kiuj niaj aŭstraliaj malmolaj lignospecoj povas esti studataj kaj taksataj. La sperta kaj konsiderema domomastrino, studante planksurfacojn, rimarkas kvalitojn de konstanta ŝparado, belajn kaj daŭre aspektajn. La scienca praktikanto de la arto de protekta medicino, responda pri elekto de la plej bona materialo por hospitala planko trovis tiun materialon en la aŭstraliaj malmolaj lignospecoj. Molaj lignospecoj, penetreblaj kaj efektive nepurigeblaj estas malakceptataj. Kvankam la plej severaj provoj neĉese aplikigas en hospitaloj, ĉar tie la danĝero venanta el la uzo de malhigienaj materialoj estus maksimumo, estas apenaŭ malpli neĉese, ke privataj domoj estu simile protektataj. En antaŭnelonga sana krucmilito en Usono, la higienaj utiloj de plankoj el malmolaj lignospecoj kaj la protekto kiun ili donas kontraŭ la dissemiĝo de epidemioj, estis precipe

emfazigataj. En unu el la libretoj eldonitaj estas dirite, "La mirinda progreso farita en la lastatempaj jaroj de fabrikantoj de malmollignaj plankoj, kaj iliaj persistaj penoj por sciigi al la publiko la meritojn, kaj dezirindecon de plankoj el malmolaj lignospecoj por domoj, kiel ankaŭ por industriaj, komercaj kaj publikaj konstruaĵoj, rezultis en simila mirinda progreso en la uzo de malmollignaj plankoj en la moderna hejmo. Virinoj favoras malmollignajn plankojn, ĉar ili scias kiom ili plibeligas la aspekton de ĉambro je modera kosto, kaj ili estas pli higienaj, pli daŭraj kaj pli facile prizorgataj. La ideo pri moderna malmolligna planko fariĝis tiel ĝenerala, ke hejmon sen ĝi oni ne plu konsideras laŭmoda." La koston oni ne povas ne rimarki. Estas vere, ke la unua kosto de bona malmolligna planko estas iom pli granda ol tio de pina ligno, sed la unua kosto de malmolligna planko estas ankaŭ la fina kosto, ĉar ĝi daŭros tiel longe kiel bone konstruita domo, sed fakte, pina planko bezonas renovigon post kompare mallongaj intertempoj. Malmolligna planko, kun ĝia pli bela aspekto, estas ŝpariga pro la neneceso kovri ĝin de muro al muro per superplanko de multekosta tapiŝo. Kelke da bonguste elektitaj tapiŝetoj, (facile formoveblaj kaj purigeblaj de polvo kiam ajn estas dezirate), kontrastaj la densan tekson de la planko, donos efekton senkompare pli kontentigan. (V. B. Trapp, en "The Argus," Melbourne. Tradukis G. D. Kvarnstrom.)

LITOVUJO ALPRENAS NOVAN, DECIMALAN MONSISTEMON.

De la 1 de oktobro estas enkondukita en Litovujo nova valuto. Ĝia monunuo nomiĝas litas, (esperante: lido), kaj valoras dekonon da amerika dolaro. Kiel tiu lasta, lido estas dividata je 100 cendoj. Pro tio litova cendo valoras dekonon da amerika cendo. Komence aperis provizoraj lidaj banknotoj presitaj en Berlino, nun jam estas alveninta la unua sendaĵo da efektivaj lidoj, presitaj en Ĉeĥoslovakio. La loĝantaro de Litovujo akceptis la aperon de lidoj tre konfideme kaj amase komencis ŝanĝadi je lidoj ne sole germanajn markojn, sed ankaŭ amerikajn dolarojn, kaj eĉ orajn rusajn rublojn. Ĉiuj bankoj estas pleupleenaj

da publiko, atendanta laŭvice la ŝanĝon de mono. Do la kurso de lido estas dependanta ne de germanaj markoj, sed de amerikaj dolaroj. Hodiaŭ, kiam mi skribas, la kurso de 1 lido egalas al 450 germanaj markoj. Dank' al la enkonduko de sia nova valuto Litovujo jam ne timas la senvalorigon de germanaj markoj. Estas nur bedaŭrinde, ke la lido ne estis enkondukita pli frue.

(el Litova Stelo.)

AUSTRALIAN WOMAN DELEGATE TO LEAGUE OF NATIONS STUDIES ESPERANTO.

The following extract from a letter to a Melbourne Esperantist will be read with interest:—

"As I had made a secret resolve to learn Esperanto as soon as I returned home, your gift of the text-book was a most timely one. Thank you very much for it; it was most kind of you. . . . It was impossible to dwell any longer on Esperanto in my speech, but I should have liked to have had a talk to you afterwards.

"I may pass through Melbourne on my way to Tasmania before long, and I will call on you to report progress. Who knows? we may be able to have a conversation in Esperanto.—Yours sincerely,

"MARGUERITE DALE."

(Should Mrs. Dale revisit the League she will be amply recompensed for the time spent in learning Esperanto, as the General Secretariat being largely composed of expert Esperantists, she will have much greater facility for gaining information on any subject desired. Red.)

XV. INTERNACIA ESPERANTO- KONGRESO EN NURNBERG,

Aŭgusto 1923.

ALVOKO AL ĈIULANDAJ FRAMASONOJ.

Laŭ la decido de la XIVa Kongreso en Helsinki, la proksima Kongreso okazos en Nurnberg (Germanujo). Ni ĝoju pri tio, ĉar en tiu urbo ekzistas malnova kaj tre agema Loĝo, en kies Templo ni sendube povos dece kunveni. Se ni konsideras ke nia lasta Templo-laboro okazis jam en Bern 1913, ni devas tre efike kaj ĉie labori por efek-

tiviĝi en Nurnberg grandan kaj gravan kunsidon de U. F. L., pli brilan ankoraŭ ol la kunsidoj en Bern, Antverp, Dresden, Cambridge kaj Geneva. La Esperanto-movado kreskas ĉiutage, la Internacia Popola-Ligo Paris gravan decidon pri ĝia alpreno, kaj ni, la granda internacia frataro, devas nepre fari ĉion laŭ niaj fortoj por subteni tiun movadon kaj por utiligi ĝin en la korespondado kun niaj FF-tutmondaj. Sed la kunveno en Nurnberg havu ankoraŭ alian gravan celon, al kiu multaj eĉ ne pensas. En 1924 okazos en Bruselo "Internacia framasona Kongreso" aŭ Kunvento. Se ni kunvenos multnombre en Nurnberg, ni povas jam tie persone konatiĝi, ni povas eĉ jam pripensi la plej bonan vojon por la alproksimiĝo de la franca-germana Framasonaro, sen kies interkomprenigado daŭra paco ŝajnas al mi neebla. Jam nun mi faris la necesajn paŝojn ĉe la Loĝo en Nurnberg, estas nun al vi komenci tuj viglan propagandon inter viaj FF, en ĉiuj landoj. Havu la bonecon anonci vin al mi por ke la komitato en preparo povu je sufiĉe frua tempo aranĝi la aferon je plej bona maniero. Mi uzas la okazon peti niajn diverslandajn membrojn, ke ili sendu al mi kiel eble plej baldaŭ ilian jaran-kotizon;* por la aranĝo de la afero ni bezonas monon; presajtoj, leter-afrankoj ktp, kostas nuntempe en Germanujo multe da mono, kaj niaj FF, en bonvalutaj landoj helpu al ni laŭ iliaj fortoj. Despli ili ĝuos ilian restadon en Nurnberg kaj la partoprenon al nia Templo—kaj aliaj frataj kunvenoj.

Mi ankaŭ rekomendas al ili la aĉetadon de la bonega esperanta broŝuro: "La libereco de konscienco kaj la tutmonda Framasonaro" havebla je nur 25 cent. de S-ro F. Schoofs, kl. Beerstraat 45, Antwerpen (Belgio).

Estas necese, ke Esperanto faru baldaŭ oficiala lingvo uzota en niaj estontaj internaciaj framasonaj Kongresoj. Tio estas ebla se ni aranĝos paroladojn en ĉiuj Framasonejoj, sek-votaj de kursoj en nia kara lingvo speciale aranĝitaj por niaj FF., kaj se ni varbos novajn anojn al nia asocio.

Kun kora fratsaluto kaj manpremo

C. Barthel, Sekretario-Kas.,
Frankfurt a. M., Wohlerstrasse 14.

* $\frac{1}{2}$ dolaron, 2,5 frankojn, 2 ŝilingojn kaj 2,7 pezetojn.

FOURTH CONGRESS OF AUSTRAL- ASIAN ESPERANTISTS,

"Sydney, Easter, 1923.

SPECIAL APPEAL TO READERS of the "Suda Kruc" and Esperantists Generally.

Estimataj samideanoj.

The Congress Committee makes this a special appeal for your active support. As you well know, the successful issue of the Congress depends upon your help; therefore, we hope that you will respond either by becoming a Congress member or by sending a liberal donation. Failing either, we are despatching concert tickets to group secretaries; these can be purchased for 1/3. Thus, you will have a memento of the Fourth, and also help in its financing.

Already our arrangements are well in hand, and we may here state that one of our chief attractions will be a concert as mentioned, featuring Esperanto in speech and song.

By this we intend to again show the public that our language is not a mere artificial jargon, nor a conglomeration of words, but a beautiful, expressive auxiliary speech.

From the Congress we shall acquire much publicity, which will be most beneficial to our movement in Australasia.

Our propaganda days are not yet over; therefore, we must use all our efforts to push ahead our aims of international understanding and good fellowship.

We wish to point out to Esperantists that success depends upon their support. The membership of Congress is:—Sydney, £1/1/-; country, interstate and New Zealand, 10/6. The secretary or treasurer will acknowledge the receipt of your subscriptions or donations. Communicate direct to Secretary, Clissold Parade, Campsie, N.S.W.

For the Committee,

L. E. FOSTO.

F. V. TAYLOR.

THE CO-OPERATIVE UNION TEACHES ESPERANTO.

The following letter appeared in the "Co-operative News," Manchester, England, on October 7th, 1922.—

"Sir,—I should like to express my gratification at the announcement that Esperanto is now included in the

subjects taught under the auspices of the Co-operative Union. I have been urging it for years, being convinced that the need for an international language should be officially recognised by our movement. I am also certain that Esperanto answers that purpose in every respect. It is easy to learn, failure being impossible for average individuals who are willing to devote a little time daily to the task of acquiring it—a task which is a delightful form of recreation. I am also convinced that Esperanto will be one of the most successful subjects in the list of classes announced by the Co-operative Union.—Yours, etc.,

"EDWIN ELLIOTT."

POST LA LIGO.

Ĉe la ligo de Nacioj ni atingis la maksimumon eblan per nia laboro. Esperanto ricevis oficialan konstaton pri vivanteco kaj taŭgeco. Plie la diskutoj remetis Esperanton antaŭ la publika opinio de la tuta mondo post la dorma silento de la milito, kio estas eble la plej grava. Ĉu tio estas vere "nenio nova," kiel skribis urĝemulo? Jam dek mil ekzempleroj de la Ligo-raporto estis tuj mendataj nur en franca kaj angla lingvoj. Itala kaj germana eldonoj preĝas. Ĉeĥa prepariĝas. Antaŭ Kristnasko la raporto devus esti aperinta en almenaŭ dekdu lingvoj se niaj naciaj societoj vere ekzistas.

Nun, oni demandas, kiam la Ligo reprenos la diskuton en plena kunsido kaj alvenos al decido definitiva? Nia respondo estas klara: ni tion klopodos kiam niaj francaj kaj britaj samideanoj estos mem konvinkintaj sian propran registaron kaj kiam niaj brazilaj amikoj estos sukcesintaj. ne nur ke ilia registaro honoru Esperanton per stratnomoj, subvencioj kaj dekretoj, sed ankaŭ tute simple per pozitiva ordono al siaj reprezentantoj ĉe la Ligo.

En nia julia numero ni avertis kontraŭ fantaziaj iluzioj kaj konigis la kontraŭbatalon de potenca registaro. Tie ĉi ni povas fari multon, sed ne ĉion. Genevo ne estas miraklejo. UEA ne estas Dio eĉ ne riĉulo. Malgraŭ nia manko de mono kaj forto, ni povas senlace informi, sugesti, interesi, sed ne devigi. La esperantistoj devus kompreni tion: la

plej belaj argumentoj nenion povas kontraŭ ordonoj skribitaj el eksterlandaj ministrejoj. Sur tiuj ministrejoj povas influi nur la naciaj societoj. Ĝis kiam la naciaj societoj estos farintaj sian tutan devon kaj estos nin informintaj pri tio, ni ne riskos eĉ unu planan paŝeton eĉ la Ligo de Nacioj. Kiom da ili eĉ tute ne vizitis sian propran registaron? Kiom da ili eĉ nenion faris por ĝin interesi?

Tion diris al mi la registaraj delegitoj mem. Kelkaj societoj agis. Ekzemple la nederlanda sukcesis, ke ĝia registaro voĉdonu favore, eĉ kvankam silente. Al ĉiuj agintaj ni kore dankas. Al ĉiuj ceteraj ni lastfoje alvokas: komprenu vian respondecon. Armilon vi nun havas en la mano: la raporton. Uzu ĝin kaj informu nin pri viaj klopodoj. Nur per ĉies kunhelpo ni venkos. Unu sola sindeteno povas detrui la laboron de ĉiuj ceteraj. Ni ne permesu tion. Ni gajnis duan sukceson eĉ la Ligo. Ni nun celu la trian.

(Edmond Privat, en "Esperanto.")

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, okt.; **Bulletin de S. Francaise P.E.**, nov.; **Brazila Esperantisto**, jul-sep.; **Esperanto Triumfonta**, n-roj 107-112; (Numero 112 havas duan folion plenan de informoj pri la kongresa urbo, Nurnberg, kaj ankaŭ la unuan numeron de la "Revuo" monata aldono al "Esp. Triumfonta". La enhavo estas "Nurnberg, la lulilo de la Esperanto movado, kun portreto de Leopold Einstein, Poemo al la rememoro de Einstein, Nurnberga Legendo kaj Nurnberga Somervespero). **Espero Teozofia**, sep-okt.; **Esperanto Finnlando**, aug.-sep., okt.; **Esperanto-Praktiko**, okt.; **France Esperanto**, nov.; **Konkordo**, jul.-sep.; **Katolika Mondo**, n-roj 3-4; **Litova Stelo**, sep-okt.; **La Progreso**, okt.; **Literatura Mondo**, Andrassy ut, 81, Budapeŝto VI, 10/- jare, N-ro. 1, okt.; **La Interligilo**, Monata organo de la unueca poŝta federacio de Francujo, N-ro. 1, okt.; (adreso, 54 rue Custine, Paris). **La Semisto**, jul.-sep.; **La Revuo Orienta**, okt.; **La Verda Ombro**, okt.; **La Nova Epoko**, okt.; **La Unuigita Tuthomaro**, sep-okt.; **La Policisto**, okt.; **La Espero**, okt.;

L'Esperanto, okt.; **Pola Esperantisto**, nov.; **Sennacieca Revuo**, okt., nov.; (eldonkvanto 6000 ekzempleroj!), **Verda Utopio**, okt.

The Australian Peace Alliance (Aŭstralia Ligo Porpaco) proponas, ke post intertraktado per internaciaj konferencoj okazu en la ŝtatoj samtempaj referendumoj, je kiuj la viroj kaj virinoj respondos al la jena demando: "Ĉu vi konsentas, ke ĉi tiu respubliko (aŭ regno) sin senarmigu tute, kondiĉe ke la aliaj ŝtatoj faros same?"—Detaloj haveblaj el F-ino. Moore, 40 Evelina Rd., Toorak, Vic.

LA EKKLEZIA ESPERANTISTA LIGO.

La raporto por la pasinta jaro ĵus aperis. Interesa ero estas la sciigo, ke Kolonelo Robinson finis la tradukon de la plena teksto de la famkonata romano de Defoe, "Robinson Crusoe," kiun li komencis verki kune kun la nun mortinta s-ro. Johano Wilson, el Leek. Oni faras arangojn por la eldono de ĉi tiu kaj alia grava traduko de la Eklezia Esperantista Ligo.

TO EACH READER:

Please made an endeavour to get one new subscriber.

Use Form below.

ORDER FORM.

To the Secretary,

Esperanto Journal Committee,
Box 1367, Elizabeth St. P.O.,
Melbourne.

Please send me "La Suda Kruc" for 12 months, post free, commencing with.....issue, for which I enclose the sum of 4/6.

Name.....

Address.....

Books! Books! Books!

JUST what you have been waiting for. £50 worth of Books on hand at reasonable prices. Make your Christmas Present a Book, and let it be Esperanto Literature. The latest shipment includes:—

La Karavano, 2/-.
 La Vendetta, 2/2.
 Tra la Mondo, Vol I., 1/3.
 Vol. II., 2/-.
 Complete, 3/-.
 Tatterley, 1/3.
 La Faraono, 9/6; Comp., 3 Vol.
 Batalo de la Vivo, 1/3.
 Struvelpetro, 2/3.
 German Text Books, 2/-.
 German Dictionaries, 2/3.
 Pro Kio, 1/9.
 Kantistino, 1/3.
 Mirinda Amo, 3/9.
 Dua Ekzercaro, 9d.
 Tri Angloj Alilande, 1/3.

Fundo de la Mizero, 1/6.
 Stranga Heredaĵo, 2/2.
 La Nigra Galero, 1/3.
 Hermano kaj Doroteo, 1/3.
 Kvin Noveloj, 2/-.
 La mirinda historio de Petro Schlemihl, 1/3.
 Nuntempaj Rakontoj, 1/3.
 Dictionaries—Fulcher and Long, 7/6
 Edinburgh, 2/-.
 Milledge, /6.
 Rhodes, 3/9.
 Esperanto Fountain Pen, 7/6.
 Esperanto Pencil Gilt, 9/6, nickel,
 4/-.

ORDER NOW!

Send for Price List to Librarian,

Australian Esperanto Association

BOX 731, P.O. ELIZABETH STREET,
 MELBOURNE.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

The House of Stead

STEAD'S REVIEW now appears in its improved new form with highly finished paper, perfectly printed, and a three-colour cover that will please the eye. We aim at continual improvement for it is to be a production worthy of presenting to Australians. Its price will remain the same.

Announcements.

During this year we will produce several New Magazines. Every one will be expertly cared for from the literary standpoint, and we are also determined to produce all our Magazines in high-grade form—good paper, good printing, and fine illustrations.

Fiction Magazine (Monthly).

Elevating and entertaining stories, good pictures and humorous drawings. Anecdotes by British, Australian and American Authors. Probable Price 9d.

Woman's Journal (Monthly).

All for Australian women. Matter will be treated by experts, and Magazine will be a production worth having and well worthy of Australians. It will be beautifully illustrated and will probably sell at 1/-

Mountain and Seaside (Monthly).

For those contemplating a holiday, this Magazine will be guide, philosopher, and friend. Interesting places throughout Victoria will be written up and illustrated, and full information given. Its pages will be strewn with good stories, sketches and humorous drawings.